

La domo konstruita el kalkoŝtono, konsistas el kvin niveloj, inter ili, du subtegmento kaj unu subteretaĝo.

Estas malofta konstruaĵo laŭ la novarta stilo, kie oni povas vidi ĉefan fasadon (Avenuo Foch) kaj flankan fasadon (strato Jeanne d'Arc).



La ĉefa fasado montras tri intertrabojn kaj la flankan fasado du.

La funkcioj de la ĉambroj estas videblaj ekde la ekstero (elstaro de la enirejo, larĝaj fenestroj de la akceptaj ĉambroj je la unua etaĝo kaj de la dormoĉambroj je la dua, malgrandaj fenestroj de la ĉambroj de la geservistoj je la tria subtegmenta

etaĝo kaj de la malembarasejo je la kvara etaĝo. Teraso sur la tegmento kompensas la mankon de ĝardeno.

Malsimetrio de la fenestroj, elstara frontono, vegetalaj ornamaĵoj (de la ŝtonskulptaĵoj, ferornamaĵoj kaj vitraloj) estas karakterizaj de la novarta stilo.

La kuracisto profesiis je la teretaĝo kaj instalas plankon el armita betono (kun aera tavolo) inter la teretaĝo kaj la unua etaĝo por sonizoli la kuricistan laborejon el la cetero de la domo.

7/Apoteko "Jacques" 1903

33 rue de la Commanderie kaj 53 rue Jeanne-d'Arc

Arkitekto : Lucien Bentz

Skulptaĵoj : Albert Vautrin

Konstruita angle de la strato de "la Commanderie" kaj de la strato Jeanne d'Arc, la domo montras kvar etaĝoj inter ili unu subtegmento.

La du fasadoj, angule kuniĝas per murfaco kiu montras balkonon kaj lukon (kiun surstaras alta turpinto).

Sur la fasadoj, estas videblaj multaj skulptaĵoj rilate kun la regiona medicina flaŭro : klematidoj kaj papavoj en la trumo de la tria nivelo, nufaroj en la subfenestraj muroj kaj balustradoj, kolĉikoj ĉirkaŭas la leterkeston.

Variaĵo de la kaduceo de la apotekistoj superstaras la enirpordon (du serpentoj elirante ĉiu, el kverkbranĉetoj, ĵetas sian langon supre de pokalo). Visterio etendiĝas ambaŭ flanke de tiu skulptita kaduceo por pli bone rimarkigi la murfacon kaj



ĝian balkonon.

La flankan pordo el skulptita ligno estas ornamita de vitraloj. La meblaro el kverkligno, ornamita de skulptita medicina planto, la daturo, kaj de lupolo en la feraj pordhokoj, estis demetita ĉirkaŭ 1970 ; retrovita, ĝi estis aŭkciita en aprilo 2014.

8/Domego "Biet" 1901-1902

22 rue de la Commanderie

Arkitektoj : Georges Biet kaj Eugène Vallin

Vitraloj : Jacques Grüber

Metalaj strukturoj : Jean Prouvé

De 1901 ĝis 1903, Georges BIET konstruis por li mem domegon, kies teretaĝo estis destinita al la arkitekta laborejo kaj la etaĝoj al la luigado (unu apartamento kaj ĝia privata teraso je ĉiu etaĝo).

Biet ne partoprenis en la Nancia Skolo, sed li admiris Viollet-Le-Duc, same Vallin, kiu influis la kurbajn strekojn de la domego.



Konstruita el ŝtalo kaj armita betono kovrita de ŝtono, tiu domego montras malpli antaŭajn partojn kaj elstarajn partojn sur la fasado.

Grandparte detruita de bombado en oktobro 1917, ĝi estis, same kiel la originalo, rekonstruita ekde 1922. Lifto estis instalita en 1925 kaj en 1927, Jean Prouvé kovris la

terasojn je la unua etaĝo per metalaj kaj vitraj strukturo.

La moderneco de la ferornamaĵoj kontrastas kun la mezepoka inspiro de skulptita ornamaĵo.

La lignaĵoj de la loĝio je la lasta etaĝo montras foliojn kaj interplektaĵojn; kato el ŝtono staras sur la tegmento; apiacoj estas videblaj en la ferornamaĵoj de la kradoj, de la balustradoj kaj de la enirpordo ; lorena kardo ornamas la pilieron de la teraso je la dua etaĝo.

9/Domo de Doktoro Spillmann 1907-1908

34 rue Saint-Léon

Arkitekto : Lucien Weissenburger

Tiu domo estis tre modifita ekde sia konstruado kaj inter la tri terasoj postrestas nur unu, kiu kovras la elstaran balkonon. La doktoro


Spillmann estis eksperta kuracisto pri la sekskontaĝaj malsanoj. La temo de la pinkonuso taŭgis por kuracisto, ĉar ĝi simbolis la eternecon ĉe Romianoj.



Nova Arto en Nancio

Itinero n° 3

Trans la fervojo



La irvojo deiras de la okcidentaj kvartaloj, kie situas la vilao Majorelle al la stacidomo.

Post la aneksado de Alzaco kaj Mozelo, sekve de la milito de 1870, la loĝantaro kreskas en Nancio. Trans la fervojo, nova urbo estas konstruita por akcepti la novajn alvenantojn. Inter ili, protagonistoj de la Nancia Skolo, ekzemple Jacques Grüber, la fratoj Daum, Émile Friant, Louis Hestaux (kunlaboranto de Émile Gallé) inspiris al la urbo entreprenemon.

1/Domego "Mangon" 1902

3 rue de l'Abbé Gridel

Arkitekto : Paul Charbonnier

Tiu domo konstruita por luigi estas unu el la unuaj realigitaj de Paul Charbonnier, ankoraŭ influita de la klasika lernado, kiun li ricevis en la nacia skolo de la belartoj en Parizo.

La tri intertraboj montras elstarajn, kiu estas ornamita de larĝaj dentrandaj folioj de vegetaloj.



2/Vilao "Majorelle" 1901-1902

1 rue Louis Majorelle

Arkitekto : Henri Sauvage


Vitraloj : Jacques Grüber

Ferornamaĵoj : Louis Majorelle

Ceramikoj : Alexandre Bigot

Louis Majorelle estis ebonisto kaj ferforĝisto. Li petis al Lucien Weissenberger konstrui fabrikan, sed li komisiis al Henri Sauvage la konstruon de lia vilao.

Li partoprenis al la projekto kaj realigis parton de la ornamaĵo (ferornamaĵo, ŝtuparo, kaj meblaro).



Eksta vilao "JK" (devenante de la nomo de lia edzino, Jane Kretz), tiu domo havas kvar malsamajn fasadojn rilate al la bezonoj de lumo laŭ la momento de la tago.

Ĝi miksas funkciismon, estetikon kaj simbolismon.

- Norde, la plej grava fasado konsistas el tri partoj : maldekstre, malpli antaŭe, la ĉefa enirejo (rimarku la tre eleganta metala markezo ornamita de branĉoj de ulmo ; centre, elstarita parto, la ŝtuparŝakto laŭ gotika stilo ; dekstre, la parto destinita al la familia vivo je la teretaĝo. La salono plivastigas malfermiĝante al teraso (hodiaŭ kovrita), kies balustrado el grejso kun metala rebrilo estas rimarkinda. Sub la subtegmento, duoncirkla arkaĵo ĉirkaŭas la aperturon de la ateliero de Louis Majorelle. Antaŭ tiu aperturo troviĝas balkono el ligno, subtenata de metalaj korbuloj. Okcidente, balkoneto estas inspirita de la japania arkitekturo. Vico da kaheloj ornamitaj de orkideoj rimarkigas ĉiun fenestron.

- Sude, la fasado montras centre, grandan, elstaran balkonon , kiu plivastigas la manĝoĉambron ; ĝi estas kovrita de teraso, kiu rilatas kun la dormoĉambro. Oni povas rimarki la kamentojn, kies dekoracia efiko estis intensigita per la uzitaj materialoj : briko, kalkoŝtono kaj grejso kaj per kamenkapuĉo el grejso kun metala rebrilo.

- Oriente, la parto destinita por la servistaro.

La neesto de simetrio ebligas stilan liberecon, samtempe fascinantan harmonion.

Ĉie en la vilao, ekstere kaj interne, estas videbla la vegetala ornamaĵo.

La grejso kun metala rebrilo laŭ la modo en 1900, oni retrovas en kaheloj, en frisoj, en bendoj de kamenoj kaj en la vegetalornamita balustrado de la teraso.

Ekstere, la lunario estas videbla en la ferornamaĵoj de la markezo kaj de la enirpordo, de la balkonoj, de la kradoj de la fenestroj kaj de la pluvodefluiloj. Interne, oni povas vidi ĝin en la ferornamaĵo de la meblo de la vestiblo, en la vitralo de la ŝtuparŝakto, pentrita sur la muroj de la vestibulo.

Aliaj plantoj ornamas la vilao : orkideoj sub ĉiu fenestro, lemnoj sur la teraso, folioj de ulmo en la defluiloj, klematidoj en la ekstera pordego, la hedero en la komenco de la ŝtuparo aŭ spiko de tritiko en la meblaro kaj en la lignoteĝaĵo de la manĝoĉambro. En tiu ĉambro, la imoŝtoj de la kvar ĉefaj aperturoj montras foliojn, florojn kaj fruktojn de kolocinto. Impona kameno el grejso kun metala rebrilo tronas centre de la manĝoĉambro.

En la salono, meblo, kiu utilas kiel kameno, demettableto, bufedo, spegulo kaj fenestro estas tre originala verko. La strukturo el mahagono estas ornamita de branĉetoj de pino.

3/Domego "France-Lanord" 1902-1904

71 avenue Foch

Arkitekto : Emile André



Konstruita el armita betono por respondi al la bezonoj de plujaj loĝejoj post la unua batalo, tiu domo estis destinita al la burĝoj, al la rentuloj kaj al la liberaj profesioj, kiuj havas 2 aŭ 3 infanojn kaj

geservistojn.

Ĝi konsistas el supra teretaĝo kaj kvar etaĝoj :

unua etaĝo kaj ĝia balkono , dua etaĝo, tria etaĝo, kiu posedas loĝion inter du elstaritaj balkonoj, sub subtegmenta etaĝo (ĝi estis aldonita por igi profitodona la domegon ; la ruĝa briko reliefigas la gablon kronitan de florburĝono), kaj mansardoj.

La fasado montras du flankajn, elstaritajn partojn (kiuj maldekstre, etendiĝas sur tri etaĝoj kaj dekstre, nur sur la tria etaĝo) kaj tri intertrabojn.

La flora ornamaĵo estas abunda : lamenetaj algoj (pordokadro de la pordego, konzoloj de la balkonoj, gablo), kardo

(balustrado de la balkono je la kvara etaĝo), filikoj (muro sub fenestrapogilo de la tria etaĝo) , simpligitaj floroj (en la ferornamaĵoj kaj en la arkoj de la loĝio).

4/Domego "Lombard" 1902

69 avenue Foch



Arkitekto : Emile André

Konstruita por la luigo, la domo prezentas perfektan simetron, krom la pordego, kiu situas flanke.

Ĝi konsistas el ses niveloj (interalie du situas sub la tegmento) kaj el kvar intertraboj.

La larĝaj fenestroj intensigas la horizontalecon. Ĉar la larĝo de la aperturoj pliiĝas laŭ la niveloj (je la tria etaĝo, la fenestregoj estas pli larĝaj ol altaj), la fasado aspektas kiel inversa piramido.

La unua etaĝo estas valorigita per granda centra balkono . La ornamaĵo estas tre sobra ; Emile André uzas la brikon kaj la kalkŝtonon en la korbansoformaj arkoj de la loĝio de la tria etaĝo, la ferornamaĵo en la kradoj de tiu loĝio (florornaĵo) kaj en la portalo (interplektitaj tigoj).

5/Domego "Loppinet"

45 avenue Foch

Arkitekto : Charles Désiré Boorgon

Skulptisto : Auguste Vautrin



La fasado konsistas el kvar intertraboj ; la maldekstra intertrabo finiĝas per neogotika frontono. Oni eniras per la pordego, kiu situas en la dekstra intertrabo.

La vegetala ornamaĵo estas la temo de la skulptaĵoj, ferornamaĵoj kaj de la vitraloj : klematidoj en la klapegoj de la pordego, apiacoj en la konzoloj de la balkono kaj de la kornico, nufaroj en la kornico, kardo, en la frontono, simpligita tulipo centre de la balkonkrado. Iridoj kaj tropeoloj ornamas la vitralegojn fare de Joseph Janin.

6/Domo de la Doktoro Jacques 1905

41 avenue Foch kaj 37 rue Jeanne d'Arc

Arkitekto : Paul Charbonnier

Ferornamaĵoj : Louis Majorelle

Vitraloj : Jacques Grüber

Skulptaĵoj : Léopold Wolff